# *Jarkunveno de la ministerio pri financo pritraktas ?efajn defiojn en 2023*



Havano, apr 4 (RHK) La ?efministro de Kubo, Manuel Marrero Cruz partoprenas ?i-mardon en la jara bilanco de la Ministerio pri Financo kaj Prezoj (MFP).

La kunveno analizas la laborojn faritajn en 2022, kaj la ?efajn problemojn solvendajn de la menciita organo, la Nacia Imposto-Administrado-Oficejo kaj la sistemoj ?e urba kaj provinca nivelo.

Same, la sistema konfronti?o kun prezmalobservoj estas traktita, unu el la plej gravaj defioj en 2023.

La kunveno anta?vidas pritakson de la stato de homaj rimedoj kaj politiko por kapabligo de gvidantoj, samkiel evoluigo de informadiko en la ministerio kaj ?ia komunika strategio.

La laborkunvenon ?eestis anka? la Vic?efministro de la Respubliko, Alejandro Gil Fernández, estro de Ekonomio kaj Planado, kaj la Ministro pri Financo kaj Prezoj, Meisi Bolaños Weiss, aliaj ekzekutivoj, kaj anka? membroj de la Centra Komitato de la kuba komunista partio.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/318679-jarkunveno-de-la-ministerio-pri-financo-pritraktas-cefajn-defiojn-en-2023

Radio Habana Cuba